



Reta ligilo al la KURSEJO: [https://edukado.net/kursejo](https://edukado.net/kursejo)

## 9.3 Registrado de kursoj, statistikaĵoj

Nia Esperanto-komunumo baziĝas ĉefe je la komuna lingvo, Esperanto. Ni ne havas geografie difinitan teritorion, landon, sed havas historion, kulturon, kulturvaloraĵojn, ideologiojn kaj komune kreitajn normojn kaj morojn. Du el la ĉefaj celoj de la movado estas disvastigi la lingvon kaj agnoskigi kaj akceptigi ĝin de diversaj lingvopolitikaj instancoj. Por ke Esperanto disvastiĝu, ni bezonas parolantojn de la lingvo, do ni devas instrui ĝin. Por akiri lingvopolitikan agnoskon ni devas pruvi pozitivajn trajtojn, funkcikapablon kaj utilojn de la lingvo. Plej ofte, kiam niaj aktivuloj pledas por agnoskigo de Esperanto aŭ ĝia enkonduko en la lernejajn instrusistemojn, la plej bona kaj rekta argumento povus esti pruvo de tio kie, en kiom multaj kaj diversaj landoj kaj en kiom da niveloj de la lernosistemo oni jam instruas ĝin. Plej ofte nia argumentado jam tie stumblas, kiam oni demandas nin pri la nombro de parolantoj tutmonde, kaj la respondoj kun diversaj kvantoj de 1-2 ĝis 10 milionoj da parolantoj ne faras nian argumentadon konvinka. Ĉe oficialaj instancoj la ekzisto de la KER-ekzamensistemo kaj la pli ol 2400 ekzameniĝintoj jam sonas bona argumento.

Estus utile daŭre havi aktualajn statistikaĵojn pri la diplomitaj kaj laborantaj instruistoj de la lingvo, pri la institutoj kaj movade aranĝitaj lingvokursoj kaj pri la nombro de la lernantoj de la lingvo dise en la mondo. Havi tiujn informojn en facile, rete atingebla loko povus esti tre konvinka argumento


dum pledado. Jam la fakto, ke ni disponas pri tiuj informoj pruvus nian profesiecon kaj montrus nian movadon organizita.


Jes, se ni havus ilin, sed ni ne havas. Ekzistas sistemo por registri la kursojn, estas interkonsento pri tio, ke ĝi estu la sola raportloko, de ĉiuj uzata, sed la kolektado de informoj tamen ne funkcias laŭ la bezonoj.

La KURSEJO ĉe *edukado.net*, kie ni de jaroj kolektas la kursregistraĵojn, eĉ en la plej bonaj periodoj havis nur kelkdekojn da registraĵoj el lernejoj, 50-60 movadajn kursojn kaj eble 2000-2500 lernantojn dise en la mondo. Tio ne sufiĉas por akiri pozitivan prijuĝon kaj agnoskon.

Tial ni (ILEI, UEA, *edukado.net* kaj ĉiuj, kiuj zorgas pri diplomataj paŝoj por Esperanto) petegas vin ĉiujn daŭre raporti pri via instruagado, kaj atentigi pri tio ĉiujn koncernatojn, kiujn vi konas.

La KURSEJO, kie vi registru la kursojn, havas 4 branĉojn. Ni kolektas informojn pri movadaj kursoj (al kiu grupo ni povas alkalkuli ankaŭ privatajn, eĉ familiajn instruadojn), lernejajn kaj universitatajn kursojn, krome eblas registri ankaŭ kursgvidantojn, kiuj pretas vojaĝi por okazigi kursojn aŭ estas disponeblaj por surlokaj lecionoj.




Je aldono de novaj kursoj aŭ instruantoj vi devas plenigi formularon pri la kurso kaj kursgvidanto mem. Ni kolektas relative multajn informojn, baze de kiuj generiĝas tre utilaj statistikaĵoj, kiuj ebligas ne nur informadon, sed ankaŭ kreon de kontaktoj kaj kunlaboroj.

Krom la loko kaj tempo de la kurso ni speciale interesiĝas pri la statuso de la kurso; ĝia ofteco; la daŭro de la kurso kaj de la lecionoj; la metodo de instruado; la lerniloj, kiujn oni uzas dum la kurso; ankaŭ gravas la notoj kaj agnoskoj, kiujn la kursanoj ricevas.

Gravas scii informojn ankaŭ pri la instruanto(j), ties kvalifikoj kaj spertoj.


Eble necesas 4-5 minutoj por registri la unuan kurson, sed poste, baze de tiu registraĵo, eblas renovigi kursinformojn aŭ uzi la saman formularon kaj sekvafoje modifi nur tiujn datumojn, kiuj ŝanĝiĝis en la novaj periodo kaj cirkonstancoj.

La kursojn eblas registri je kelkaj semajnoj, eĉ monatoj antaŭ la lanĉo. La aŭtomata sistemo per mesaĝo rememorigas la registrinton kontroli kaj aktualigi la informojn (ekz. la planitan nombron de partoprenantoj je la efektiva nombro). Post la fino de la kurso la programo mesaĝe invitas la kursgvidinton eventuale registri novan kurson aŭ raporti pri la spertoj.

La raportado gravas pro la supre listigitaj aferoj, sed la informdoninto estas ankaŭ premiita. Ekde la momento, kiam iu registras kurson, tiu havas la rajton senpere elŝuti ĉiujn ekzercojn, kiujn *edukado.net* publikigas por helpi la kolegojn en ilia instrulaboro.

La libera aliro al la pli ol 900 uzpretaj materialoj ekvalidas en la momento de la registrado kaj daŭras ĝis unu monato post la finiĝo de la kurso.

Ne neglektendas la fakto, ke se iu alia registras vian kurson, vi mem ne ricevos la rajton je elŝuto de la ekzercoj.




La statistikaĵoj pri la diverstipaj kursoj donas resumajn grafikaĵojn kaj listojn pri diversaj kursinformoj (la ligilo troveblas je la suba parto de ĉiu paĝo de la retejo).

Je ajna grafikaĵo en tiu retejparto, kiam vi klakas al la bluaj strioj, vi povas ricevi la tutan liston de la kursoj, al kiuj la strioj rilatas, kun ĉiuj detalaj informoj.

En la fino de la statistika paĝo estas listo de la uzataj lerniloj. Kiam oni klakas al la blua strio ĉe iu lernilo, eblas vidi, en kiuj lernejoj kaj kursoj oni uzas la koncernan lernilon, kaj eblas krei laborkontakton kun la koncernaj gvidantoj.

Do, kiel vi vidas, la registrado de kursoj havas plurajn avantaĝojn, kaj la registrintoj ricevas ne nur gravajn informojn, sed ankaŭ helpon.

(KK)